Estas aparte emfazitaj la nomoj de urboj kaj urbetoj en Orienta Eŭropo (Jidiŝland), en kiuj la jida lingvo estis parolata dum jarcentoj. Tiukaze penas la vortaro citi kiel eble plej multajn loknomojn. Tamen, kiam mankis fidindaj informoj/pruvoj pri la ĝusta formo de la jida toponimo, eĉ kiam estis duboj pri tia detalo kiel fonetika streĉo, ĉi tiu loknomo ne estis enmetita en la vortaron.

La specifeco de la vortaro estas la inkluzivo en ĝi de loknomoj kiel koncentroj kaj murdlokoj dum la Holokaŭsto, urboj kaj setlejoj en la Juda Aŭtonoma Regiono de la Ruslanda Federacio, same kiel kvin Judaj Naciaj Regionoj (kiel historiismoj) en Ukrainio kaj Krimeo.

La vortaro ankaŭ listigas la urbojn de mini-ŝtatoj en Eŭropo, kaj ankaŭ toponimojn de eŭropaj naciaj malplimulto kiel frisoj, soraboj, bretonoj, eŭskoj ktp.

La unua eldono de la vortaro estis publikigita antaŭ kvin jaroj, en 2015, kaj tuj elĉerpiĝis.

La dua eldono enkalkulis la mankojn, erarojn kaj mispresojn de la unua. La nombro de loknomoj en ĝi preskaŭ duobliĝis. Espereble, ĉi tiu dua plibonigita eldono de la vortaro resonancos je ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la jida – la denaska lingvo de Lejzer Zamenhof, por tiuj, kiuj studas ĝin, kaj kiuj volas paroli kaj skribi ĝin kompetente. ■



Babilu ankaŭ vi en la grupo de KEA en telegramo

Por asocioj, simpatiantoj kaj scivolemuloj

<http://telegram.esperanto.cat>

NOVA DULINGVA KOLEKTO

Carles Vela Aulesa



La 28-an de aprilo la dua libro de la kolekto estis prezentita ĉe la librovendejo Alibri, en Barcelono.

De longe nia asocio plenumas malgrandan sed signifan eldonan taskon, produktante esperant-, katalun- kaj du-lingvajn librojn. Eble vi, leganto, jam scias tion, ĉar ankaŭ de longe la estraro saĝe decidis sendi ekzempleron de ĉiu eldonaĵo al ĉiuj asocioj.

Diverseco karakterizas tiujn eldonaĵojn: libroj pri la historio de la kataluna Esperanto-movado, poemaro de Salvador Gumà Clavell (*Kiam floras la timianoj*, 2001), dulingva proverbaro de Pedro M. Martín Burutxaga (2014) ktp. Pasintjare nia asocio aldonis al tiu eldona politiko novan kolekton por publikigi dulingve mallongajn literaturajn verkojn tradukitajn el la kataluna. Oni decidis titoli ĝin laŭ la nomo de la pioniro Jaume Grau

Casas, elstara poeto kaj tradukisto el/ en la kataluna, hispana kaj internacia lingvoj, kunordiginto kaj ĉefa redaktoro de la *Kataluna Antologio*, la unua grandformata nacilingva antologio en Esperanto, eldonita en 1925 kaj reeldonita, pro sia sukceso, en 1931.

La unua libro en la kolekto estas la dulingva eldono de *Cementiri de Sinera* [Tombejo de Sinera], de Salvador Espriu, tradukita de Gabriel Mora i Arana (2020), kaj la dua volumo enhavas alian Espriu-an tradukon, *La pell de brau* [La taŭrofelo], tradukitan de Abel Montagut (2021). Tio, ke la du unuaj numeroj kundividis la saman aŭtoron, ne fontas el hazardo. Por kompreni la kialon, oni devas retrorigardi la jaron 2013an, la Espriu-Jaron. La 20-an de aprilo

ĉi-jare, Kataluna Esperanto-Asocio organizis omaĝon al la poeto el Santa Coloma de Farners, dum kiu oni laŭte legis fragmentojn de tri Espriu-aj verkoj, de la du jam menciitaj kaj de *Assaig de càntic al temple* [Eseo de kanto en la templo], tradukita de Rikardo A. Reyna kaj Llibert Puig.

Tombejo de Sinera estis tradukita de Gabriel Mora en la 1980-aj jaroj kaj publikigita de KEA en 1989. Tamen, kiam oni petis al li permeson por deklami publike kaj omaĝe erojn de lia traduko, li, 88-jaraĝa, decidis revizii la tradukon kaj liveris novan originalon iom antaŭ la publika laŭtlegado. KEA decidis eldoni la novan tradukon, tamen tiam ne eblis kaj la verko restis «tir-keste», ŝanc-atendante. Kiam oni pripensis la novan

kolekton, ĝi tuj estis la unua kandidato, kvazaŭ kiel postmorta omaĝo al la tradukinto, forpasinta en 2014.

Ankaŭ okaze de la Espriu-omaĝo oni demandis al Abel Montagut, ĉu lia traduko de *La taŭrofelo* publikigindus. Kaj ni devas precizigi «lian tradukon», ĉar, kvankam esperantigoj de katalunaj verkoj ne kutimas post la ora epoko de la unua triono de la dudeka jarcento, ekzistis du tradukoj de tiu poemaro de Espriu, eĉ samtempaj. Dum Abel Montagut alfrontis sian katalunigon, ankaŭ la poeto Manuel de Seabra tradukis ĝin, paralele al sia portugalingo; la du verkistoj estis nesciaj de la projekto de la alia. Kia diabla koincido! Kvankam Manuel de Seabra publikigis iujn poemojn en literatura revuo, ambaŭ projektoj restis neeldonitaj. La afero devis esti solvita, kaj la Kolekto Jaume Grau Casas estis la taŭga preteksto.

La originalo de Montagut bezonis ĝisfundan revizion, laŭ opinio de la tradukinto, sed post tio la 28-an de aprilo la libro estis prezentita ĉe la librovendejo Alibri, en Barcelo-

no. Kvankam kun loko limigita de la san-alarma, la tradukinto kaj la enkondukantino, profesorino Olívia Gassol i Bellet, filologo specialiĝinta pri la Espriu-a verkaro, priskribis kaj la signifon de la poemaro kaj ĝian historian kuntekston al la ĉeestantaro kaj al la jutuba spektantaro, ĉar la prezento estis rekte dissendita tra la KEA-kanalo. Fakte, oni ankoraŭ povas spekti ĝin ĉe youtu.be/GG3McVLEXpc.

La du Espriu-aĵoj malfermas vojon, kiu ne nepre devas esti poezia. Ĉiu ĝenro bonvenas: romanoj, noveloj, teatraĵoj, komikoj ks. Eble la nura limo, kiun oni starigis, estas la formato: oni planas prezenti al la kataluna kaj internacia legantaroj allogajn titolojn malmultekostajn (do, malgrandajn), kiuj permesu al la unua gustumi la internacian lingvon kaj al la dua ekkoni nacilingvan literaturon kutime malfacile alireblan. Ekzistas alia vojo, paralela sed inverssenca (eldoni katalunigojn de originala esperanta literaturo), vojo ankoraŭ malmulte vojita ĉe ni, kiu povus esti trairita de tiu kolekto, kial ne?... aŭ de

nova... ni atendu la akcepton de la legantaro al la jam eldonitaj kolekteroj.

RE-VERKI PROPAN TRADUKON: GABRIEL MORA I ARANA KAJ TOMBEJO DE SINERA

La retradukado, okaze de la Espriu-Jaro, al kiu Gabriel Mora i Arana submetis sian unuan tradukon, jam eldonitan, meritas nian atenton.

En la antaŭparolo al la unua versio 1989a, ankaŭ reproduktita en la dua 2020a, la tradukinto prezentas la malfacilecon alilingvigi kaj tiam hermetikan eĉ ambiguan poeton (p. 9¹) kaj poemojn kun «obskuraj punktoj» kiel tiujn de Espriu (p. 13). Por solvi tiun defion, Mora i Arana «konfesas» ke li estis devigata subjektive interpreti kaj ke, malgraŭ la klopodo respekti la originalan metrikon, li

1. Ni citas laŭ la 2020a eldono.

GABRIEL MORA I ARANA

Gabriel Mora i Arana naskiĝis en Castellar del Vallès la 13an de septembro 1925. La Civila Milito malhelpis al li studadi kaj, fine de la milito, adolesk-aĝe, estis devigata labori. Tio, tamen, ne apartigis lin de lia pasio, la poezio, kiun, avida leganto, li voris. La verkoj de Joan Arús, Josep Maria López-Picó, Carles Riba, Josep Carner... instigis lin ekverki, aŭtodidakte. Dume, post la militservo, li ekkonis sian duan pasion, Esperanton, kiun li lernis de la pioniro Delfí Dalmau. En 1958 li edziĝis je Isabel Luís Bellorbí kaj la sekvan jaron naskiĝis Gerta, lia sola filino. Ili ekloĝis en Manresa, kiun ili ne forlasos. En ĝi, Gabriel engaĝiĝis por la loka asocia vivo kaj kunlaboris en la regiona gazetaro kaj en internaciaj Esperanto-revuoj. Baldaŭ ambaŭ pasioj –poezio kaj Esperanto– interkruciĝis: li ekverkis poezion en Esperanto kaj instigis la esperantan literaturon; fakte li estis unu el la restarigintoj de la Internaciaj Floraj Ludoj. Ĉar li jam bone regis metrikon kaj rimon, la poemaroj sekvis unu la alian: *El silenci blau* [La blua silento] (neeldonita); *El rostre nou de Narcís* [La nova vizaĝo de Narciso] (1975); *Calidoscopi de sol i de celístia* [Kalejdoskopio de suno kaj de stellumo] (1980); *Foc d'arrels* [Fajro el radikoj] (1983); *A tot o a res, l'amor* [Por ĉio aŭ por nenio, la amo] (1985); *Renou de mites* [Bruo de mitoj] (1986); *Innovació dels orígens* [Novigo de la originoj] (1990). Kaj sekvis sin la premioj: li gajnis la Oran kaj Arĝentan Violon 21-foje, la Naturan Floron 16-foje kaj la Oran Englantinton 14-foje, kaj ricevis la titolon de Florluda Majstro 3-foje (1971, 1975 kaj 1990), inter multaj aliaj distingoj. En Esperantujo, krom verki plurajn poemojn –unu el ili kolektitan en *Esperanta Antologio. Poemoj 1887-1981* (1984): «Tri nudaĵoj de Modigliani»–, li tradukistis. Por soleni la centjariĝon de Esperanto, li esperantigis *Paraules per la Pau* de Miquel Martí i Pol (*Vortoj por la Paco*, 1987). De Salvador Espriu li tradukis *Cementiri de Sinera* [Tombejo de Sinera], eldonitan de KEA en 1989, tradukon kiun li mem reverkis baldaŭ antaŭ sia morto. Mora i Arana mortis la 25an de novembro 2014 en Manresa... nur kelkajn monatojn post emocia omaĝo, kiun li ricevis en sia urbo okaze de la Tago de la Poezio, la 21an de marto sam-jare.

malkapablis ne aldoni foje pliajn silabojn («maksimume du», li atentigas – zorgante tamen, ke tiuj pli longaj versoj «havu la saman ritmon ol la katalunaj originalaj versoj») (p. 13). Samcele, li pravigas elekton de kelkaj vortoj, kiel ekzemple de la neologismo «vitekso» por traduki *aloc* (*Vitex agnus-castus*) (p. 15), aŭ klarigas kiom malfacilis al li traduki *rial*, kiu aperas kvarfoje, per unu sama vorto ĉie, kaj ke li finfine uzis foje «vojo» foje «vojo torenteca», «por esprimi la iamajn pluv-torentajn fluejojn,

aŭ pluv-torentujojn devenantajn de montĉenoj pli-malpli paralelaj al la marborda linio, kaj pli-malpli perpendiklaj al la maro, en apudaj plaĝaj urboj kaj urbetoj nord-orientaj. Tiuj nun sekaj fluejoj jam fariĝis, pro la vilaĝaj kaj urbaj disvastiĝoj, ordinaraj, veturvojoj, kaj eĉ stratoj kaj promenejoj. Ofte, ankoraŭ, pro subitaj pluvegoj kaj longdaŭraj pluvadoj, tiuj “rials” sintenas kelktempe kiel veraj torentoj, kaj eĉ de tempo al tempo, inunde» (p. 15). Fakte, la prologo ĉie elŝvitas deziron de laŭvorteco, tra-

dukriterion ankoraŭ validan en la 1980-aj jaroj, precipe rilate al la traduko de klasikaj aŭtoroj kaj poezio –fakte, tiam, la plejmulto de la katalunaj tradukistoj ankoraŭ katalunigis ilin en prozo.

Laŭ mi, estas ĉi tiu deziro je laŭvorteco, kiu plejparte motivas la retradukadon. Unuavice, la nova versio montras pli bonan komprenon de la originala teksto. En la unuaj versoj de la poemo 2 li korektas la subjekton:

II	2	
Quina petita pàtria encercla el cementiri!	Kia malgranda patrolando ĉirkaŭmurigas la tombejon, (1989)	Kian malgrandan patrolandon ĉirkaŭmurigas la tombejo, (2020)

Aŭ en la poemo 26 li anstataŭigas i-formon per as-formo:

XXVI	26	
No lluito més. Et deixo el sepulcre vastíssim	Ne plu lukti. Mi lasas al vi la vastan tombon: (1989)	Ne plu luktas mi: lasas al vi la vastan tombon (2020)

Duavice, li enkondukas ŝanĝojn en la sintaksan ordon. Ekzemple, en la finaj versoj de la poemo 2:

II	2	
No estimo res més, excepte l'ombra viatgera d'un núvol. El lent record dels dies que són passats per sempre.	Mi amas nenion pli krom l' ombro de vojaĝanta nuboj kaj la memor' pri la tagoj por ĉiam forpasintaj. (1989)	Nenion pli mi amas, krom l'ombro de vojaĝanta nuboj kaj la memoro pri la tagoj, tiuj, por ĉiam forpasintaj. (2020)

Triavice, li repensas kelkajn vortkunmetaĵojn –tiun rimedon tiel propran (kaj tiel riĉan!) de la lingvo Esperanto. En la lasta verso de poemo 21 («la sorra molla») li ŝanĝas la pli laŭvortan «la malsekan sablaron» per «la malsekan bord-sablon», kie *bord-* kompletigas la bildon, kvankam ĝi malproksimigas la tradukon de la laŭvorteco. Ankaŭ en la lasta verso, sed de la poemo 14 («amb pauses d'or i somni»), Mora i Arana ne nur serĉas

pli precizan tradukon sintakse –kio montras pli bonan komprenon de la originalo–, sed trovas solvon kiu pli bone uzas la rimedojn de Esperanto: «reve, laŭ paŭzoj oraj» fariĝas «laŭ paŭzoj or-revigaj», certe *or-revigaj* sugestas pli bone la bildon de la originalo.

Ĉie la reverkado montras kaj pli bonan komprenon de la originalo kaj pli

grandan regadon de la altraduka lingvo. Mora i Arana ne forlasas serĉon de laŭvorteco, karakteriza de la momento kiam li ektradukis la poemaron kaj karakteriza de lia generacio. Certe, nuntempa traduko de *Tombejo de Sinera* certe naskus malsimilajn solvojn. Tamen, eble sen plene konscii pri tio, lia matura aĝo (li reverkas la tradukon preskaŭ naŭdekjaraĝa) permesas al li krei pli fajnan tradukon. ■

LA MAGIA PULVORO

Joan Inglada Roig



La magia pulvoro estas la unua el kvar libroj, kiujn Cuixart verkis en malliberejo, rakonto, kiun li povis prezenti publike en Barcelono la 11an de aprilo 2021 danke al mallibereja forpermeso.

”

Subite ĉiuj homoj sentis nerezisteblan bezonon zorgi unu pri la alia, ami senmezure unu la alian kaj ĉesi ĵeti rubon ĉien

Jordi Cuixart i Navarro¹ estas kataluna entreprenestro kaj politika aktivulo, prezidanto ekde la 19a de decembro 2015 de Omnium Cultural, kultura asocio kun preskaŭ 200 000 membroj. En la juĝo pro la kataluna sendependiĝa procezo li estis kondamnita de la Supera Kortumo de Hispanio, en oktobro 2019, al 9 jaroj da malliberejo kaj malpermeso je publika posteno pro la delikto de ribelo.

La magia pulvoro estas la unua el kvar libroj, kiujn Cuixart verkis en malliberejo, rakonto, kiun li povis prezenti publike en Barcelono la 11an de aprilo 2021 danke al mallibereja forpermeso.

«*La magia pulvoro* aperas tre nature. De kiam mi eniris en malliberejon, mi tre klare diris, ke mi ne faru ĝin nevidebla kaj pluiru kun la familio», diris Cuixart, kiu memoris: «En Soto del Real² same kiel en Lledoners², ĉe la

(1) Prononcu Ĵordi Kuŝárt. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kataluna_sendependiĝa_procezo
(2) Malliberejo.

muroj de la vivoĉambro estas astronauto. *La magia pulvoro* naskiĝas de la aventuroj, kiujn ni elpensis por distri niajn infanojn». Kaj li aldonis ke: «En la libro mi provas pledi, ke aŭ ni engaĝiĝas aŭ ni riskas perdi la fundamentajn rajtojn, la uzon de homaj rajtoj kaj ankaŭ la estontecon de la planedo kaj la tuta homaro» kaj ankaŭ tion ke: «Ni ne povas rezigni pri songoj. Ni ne povas rezigni, ke ĉi tio povas esti savita. Sed por povi savi la homajn rajtojn, por povi savi la rajton de Katalunio ekzisti kiel tio, kio ni estas, la rajton povi esti katalunoj, por povi savi la planedon; ni devas refaldi niajn manikojn aŭ ni ne sukcesos».

Mia familio donacis al mi ĉi tiun rakonton por Kristnasko 2020, kaj mi tiom ŝatis ĝin, ke mi tuj tradukis ĝin en Esperanton. Mi poŝte komunikis tion al la aŭtoro en la malliberejo de Lledoners, kaj li invitis min al la publika prezento de la libro, sed mi ne povis ĉeesti pro distrikta enfermiĝo kaŭze de la koronaviruso, ĉar mi loĝas en la komarko Garraf, 50 km sude de tiu de Barcelono. Anstataŭ mi, ĉeestis la prezentadon Alfons Tur, kiu parolis kun la aŭtoro antaŭ la evento kaj donis al li la leteron, en kiu mi klarigis la kialon de la traduko. Jen ĝi:

«Subite ĉiuj homoj sentis nerezisteblan bezonon zorgi unu pri la alia, ami senmezure unu la alian kaj ĉesi ĵeti rubon ĉien. Kaj la homoj ĉesis batali. Kaj ili komencis trovi solvojn al problemoj, kiuj antaŭ longe ŝajnis nesolveblaj. Kaj la suno rebrilis, kaj malsato kaj malfacilaĵoj malaperis. Kaj tiel venis la tago, kiam la militoj ne trovis soldatojn, kiuj volis iri tien kaj la riveroj estis plenaj de vivo denove... Kaj estis danke al la magia pulvoro, ke homoj eksciis, ke la plej bona maniero kunvivi estas aŭskulti unu la alian kaj ĉiam metante nin en la lokon de la alia.»

Mi ne scias kial, sed ĉi tiuj vortoj pensigis min, ke Zamenhof serĉis **la magian pulvoron** antaŭ pli ol 150 jaroj, kiam li loĝis en Bjalistoko, lia hejmurbo, kie multaj etnoj loĝis kaj oni parolis diversajn lingvojn, kiel la germanan, la rusan, la polan aŭ la jidan, kio malfaciligis la

komprenon kaj kaŭzis batalojn inter la junuloj sur la stratoj, ĉar ili ne komprenis unu la alian. Ĉi tio pensigis lin, ke trovi komunan, neŭtralan kaj facile lerneblan lingvon uzotan en situacioj, kie parolantoj de diversaj kulturoj aŭ landoj devas komunikiĝi, favorus pacon en la mondo, ĉar, kiel diris Jordi Cuixart, la plej bona maniero vivi kune estas aŭskulti nin mem kaj ĉiam meti nin en alies lokon. Ĉar timo estas senutila. Kaj en la vivo estas nenio timinda, vi nur devas kompreni ĝin. Kaj jen la klarigo pri la traduko al la internacia lingvo Esperanto de *El polsim màgic*, *La magia pulvoro*. Mi ankaŭ pensis, ke la traduko povus utili por la esperanta komunumo religi sin kun siaj radikoj per la valoroj de la teksto verkita de Jordi Cuixart.

Dum la prezento-intervjuo, Jordi Cuixart, al la demando pri la origino de la inventitaj nomoj kaj la kialo de la tuta libro, respondis: «.. jen aferoj, kiujn vi realigas poste, kiam vi jam verkis ilin ... la esperantistoj en la salono jam vidis, ke la libro eligas certan imagon aŭ certan vizion de komuna lingvo, kie ni ĉiuj povus rekoni unu la alian kiel egaluloj, kie ni ne rezignis pri nia propra lingvo, la kataluna ... ĉio eliris sufiĉe spontanee ... mi volas diri, ke la subkonscio, mi pensas, helpas nin iomete».

Jen tie unu stelo
kaj jen unu planedo,
fin' de l' rakonto
jen la rimedo. ■




Jordi Cuixart, *El polsim màgic*.
Comanegra, 2020.



«Por la katalunaj esperantistoj. Mi brakumas vin per la tuta forto de mia koro. Ĉiam antaŭen!»
Jordi Cuixart.

UNA TRADUCCIÓ APAGADA D'UNA OBRA BRILLANT

Jorge Camacho Cordón



Salvador Espriu, **Cementiri de Sinera. Tombejo de Sinera.** Traducció de Gabriel Mora i Arana. Sabadell: Associació Catalana d'Esperanto, 2020 [Col·lecció Jaume Grau Casas, 1].

Recordem al lector que Salvador Espriu (1913-1985) és un dels poetes catalans més importants del segle XX i que el seu primer llibre de poemes, *Cementiri de Sinera*, publicat el 1946, és sens dubte una de les obres més rellevants de la poesia catalana. Sinera és l'anagrama poètic de la vila costanera d'Arenys de Mar. Els versos lluminosos i les clares meditacions del poeta sobre el pas del temps i, principalment, sobre la mort es mouen pel cementiri, el mar i els xipresos de Sinera.

Després d'una primera edició en esperanto el 1989, vet aquí la segona, amb la traducció revisada pel mateix traductor, Gabriel Mora i Arana. Es presenta en un format de quadern de trenta-dues pàgines, amb tapa o coberta tova, grapada, quadrada (21 x 21 cm); un format tal vegada adient per a presentar poemes de versos curts en edició bilingüe a dues columnes en la mateixa pàgina però que té, al meu parer, menys aspecte de llibre i és menys atractiu que una edició de butxaca enquadernada en rústica (els amants de les prestatgeries i les prestatgeries mateixes saben a què m'estic referint).

El traductor explica que “ha intentat traduir a l'esperanto amb la major fidelitat” i que, pel caràcter relativament breu dels versos dels trenta poemes (sovintegen els heptasíl·labs), no sempre ha respectat “el número de síl·labes de l'original”, però sí, en la mesura que li ha estat possible, en el cas de les set tankes.

Aquesta decisió em sembla bé, en principi. Per culpa de la influència continuada

durant decennis del manual de versificació *Parnasa gvidlibro* (Guía del Parnàs) i dels models de traducció de Kalmán Kalocsay, Gaston Waringhien i Fernando de Diego, entre d'altres, els traductors de poesia a l'esperanto han tingut el costum de reproduir les formes fixes de determinats tipus de poemes mitjançant formes igualment fixes, fins i tot substituint les rimes de l'original per altres de la llengua d'arribada. Aquest mètode, sistema o enfocament es troba desfasat en el “món normal”, a tot estirar podríem exceptuar el cas de Rússia (i en concret, només d'alguns parnasauris esperantistes russos). La forma fixa és un motlle i entossudir-se en reproduir-lo “fidelment” no és sinó una obsessió antiga i anacrònica, i encara més quan es tracta d'edicions bilingües. En aquest cas, quan s'aporta l'original, n'hi ha prou en centrar-se únicament en la tasca de traduir significats, sentits, expressions i imatges (em refereixo a les imatges poètiques).

Per desgràcia el traductor aquí no va fer ni una cosa ni l'altra. La mancança principal és l'absència d'alè, de llenguatge poètic. L'estil es fa pesat, resulta maldestre i sovint és molt poc fidel, fins i tot esdevé xocant. Una traducció literal hauria estat preferible.

Vegem el primer poema, a tall d'exemple:

Pels rials baixa el carro
del sol, des de carenes
de fonollars i vinyes
que jo sempre recordo.
Passejaré per l'ordre
de verds xiprers immòbils
damunt la mar en calma.

Traduït per Montserrat Franquesa

I vet aquí la traducció:

El vit- kaj fenkolriĉaj holmoj
kiujn konstante mi memoras,
la ĉaro de la suno venas
laŭ vojoj iom torentecaj.
Promenados mi tra la vicoj
de senmovaj cipresoj verdaj,
super l'apuda maro kalma.

Sense que en puguem endevinar el motiu, el traductor ha alterat l'ordre dels versos, de les frases i dels recursos. L'encavalcament "el carro / del sol", d'una bellesa i efecte particulars, queda anul·lat pel fet d'acumular tots els mots en un vers. Per traduir "rials" (rieres, rambles) ha triat una definició quasi de diccionari en lloc d'una paraula una mica més precisa (se m'acut "torentejo", la llera d'un torrent). El lèxic de l'esperanto és força semblant al català i d'aquesta similitud se n'ha de saber treure profit (en castellà passa el mateix), encara que paraules que sovintegen, com "ulls" o "mira", passin a tenir tres síl·labes en esperanto ("okuloj", "rigardas"), resultin més feixugues i facin nosa. Això ho veiem en "rials" i també en "xiprers", sense la possibilitat d'elidir la terminació del plural de "cipresoj" (cosa que sí es podria fer en singular), un arbre amb un simbolisme especial per la presència habitual en els cementiris de la Península Ibèrica.

Demano disculpes a l'avançada
pels errors que pugui cometre
pel coneixement limitat que
tinc del català, però m'atreveixo
a proposar una versió molt
més propera a l'original:

Sur torentejoj ĉaro
de l' sun' venas el holmoj
fenkol- kaj vit-abundaj
kiujn mi ĉiam memoras.
Mi promenos tra vicoj
de senmovaj cipresoj verdaj
super la maro kalma.

("maro kalma" en lloc de "kalma maro" per tal d'evitar la rima "ĉaro / maro"). I si es vol ser més fidel respecte al número de síl·labes, "memoradas" i "fiksaj" en lloc de "ĉiam memo-

ras" i "senmovaj" podrien ser una bona alternativa.

Algú pot pensar que soc un perepunyetes i busco tres peus al gat. Tinc la impressió general que a l'estil de la traducció li falta elegància, de fet, he provat de traduir uns quants versos més, provatures que ara no aportaré aquí. En lloc d'això, prefereixo fer una recomanació: si s'escau de fer una tercera edició, que sigui amb una nova traducció d'un autor que sigui més solvent en aquest àmbit, com podrien ser, per exemple, Abel Montagut, Nicolau Dols, Suso Moinhos o Antonio Valén (potser el més parnasquista dels quatre).

Pel que fa a la col·lecció Jaume Grau Casas, nom en homenatge al poeta i traductor pioner i a la seva *Kataluna antologio* (Antologia catalana), té la intenció de publicar cada any un títol bilingüe, que no serà necessàriament de poesia, amb el doble objectiu de donar a conèixer la literatura catalana a l'exterior i l'esperanto al públic català. Un objectiu molt lloable, però caldrà posar més atenció a la qualitat del text (en el cas que ens ocupa, la traducció a l'esperanto, pel que fa al pròleg no hi tinc cap objecció), i també a l'aspecte material de la publicació, per tal que atregui al lector amb més llum i destaquí com a llibre. ■

”

La manca principal és l'absència d'alè, de llenguatge poètic



TRA LA PADOJ DE LA VIVO

Carlo Minnaja



Julian Modest
Tra la padoj de la vivo
 Romano
 Eld. Libera, 2020
 p. 128

Julian Modest (pseŭdonimo de bulgaro Georgi Mihalkov), produktis dum sia pli ol 40-jara literatura aktiveco pluron da romanoj, noveloj, recenzoj kaj eseoj en diversaj revuoj (lastatempe preskaŭ ĉiunumere en *Literatura Foiro*). Lia unua dramo datas je 1983, sed lia produktivo forte intensiĝis tute lastatempe: en la nura jartrio 2018-2021 aperis el lia plumo ok romanoj (el kiuj kvin krimromanoj) plus du novelaroj, el kiuj unu, *La ĉasisto de sonĝoj* (Libera, 2019) kunigas 26 rakontojn plej diversspecajn.

Nuntempa vicprezidanto de la Esperanta PEN, membro de la Asocio de Bulgaraj Verkistoj, eksa lektoro pri esperanto ĉe la Sofia universitato, vivinta, post edziĝo al hungarino, ok jarojn en Budapeŝto kaj reveninta poste al Bulgario, lia nomo estas fama en la kultura Esperantio. Lia stilo kaj koncepto pri la novelo estas ege maturaj; ni diru, ke ne malofte li lasas la finon nedifinita (iu recenzanto uzis terminon «stumpa»), tiel ke leganto povas mem ĝin intuiĉi aŭ konstrui: eble la geamantoj repaciĝas, eble unu foriras kaj ne plu revenas, eble la posta sorto de la protagonisto estas supozata ne plu interesa, eble iu intrigero restas nesolvita. Ofte li finas per surprizo.

La romano *Tra la padoj de la vivo* (Libera, 2020) rakontas pri patrino Eva kaj solfilino Lili kaj pri kiom la unua sin dediĉas, plene kaj komplete, al la dua. Fakte filoj estas filoj dum la tuta vivo, eĉ kiam ili fariĝas plenkreskaj kaj finance memstaraj: *Nia rolo estas naski infanojn*, deklaras Eva. Estas diskutinde, ĉu tion pensas

ankaŭ la nuna generacio, kie, almenaŭ en la okcidentaj tiel nomataj «riĉaj» landoj, patriniĝoj okazas pli kaj pli malfrue kaj tiel, kvankam ne nur tial, la naskonombro malkreskas; en Italio pasintjare la naskonombro malsuperis la mortonombro je 250 000 anoj, tio egalvaloras al malapero de urbo kiel Florenco.

Eva tratabas sian ekziston en malfacilaj situacioj: ŝi ja havas sian profesion de apotekistino, sed jen unu, jen dua, jen eĉ tria amrilato miskonkludiĝas diverskaŭze, kaj ŝi restas sola kaj graveda, sed ŝi decidas naski la idon. Al la sorto ŝi respondas kuraĝe kaj ŝia filino iĝas la nura kaŭzo de ŝia vivo, kiun ŝi volas mastrumi sola, eĉ rifuzante novan eblon de familio: ŝi ne ŝatas «revarmigitan supon» kiel oni diras itale pri klopodo reakiri antaŭan amat(in)on forlasitan. Delikataj sentoj, defendo kaj ŝirmo de la propra filino, kiu insistas por iĝi baletistino, en socio kiu konsideris tiun profesion malmorala; fakte Modest priskribas socion tipe bulgaran, kvankam la lando ne estas eksplicite deklarita, kiu povas speguli almenaŭ unu generacion antaŭ la nuna. Ekzemple kontraŭkoncipado ŝajnas nekonata eĉ de apotekistino, kvankam la kontraŭkoncipa pilolo estis jam uzata en la komencaj Sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento (la malpermeso de Papo Paŭlo VI okazis en 1968).

Neniu okazaĵo en la romano estas ekster la normalo: enamiĝoj, disiĝoj, akcidentoj, trompoj, kokroj estas ja ne maloftaj ingrediencoj en la padoj de la vivo, sed la delikateco per kiu Modest traktas ĉiujn ĉi situaciojn, krom la svelteco kaj facileco de la stilo, igas la verkon ĝuinda. ■

IMAGE PRI LA BAZA LITERATURA KRESTOMATIO

Valentin Melnikov

ĈU ONI POVAS VERKI RECENZON PRI NELEGITA LIBRO?

Kiam aperis nova versio de la *Baza literatura krestomatio*, mi tuj esprimis mian intereson kaj deziron recenzi. Mi havas la eldonon de 1982, trovis en interreto la enhavtabelon de la nova eldono, konstatas, ke el 64 nove aldonitaj pecoj, mi jam diversloke trovis kaj legis 46, kaj, sciante ke rusia poŝto funkcias ege malrapide (sendaĵo el eksterlando drivas minimume monaton), por ne perdi tempon, ekverkis la recenzon... Jen kio malnetiĝis:

* * *

Ĉiu el ni post fino de baza kurso alfrontis la demandon: por kio apliki Esperanton? Tre multaj, i.a., volas legi beletron, samkiel en la denaska lingvo. Tamen, se en naciaj lingvoj ekzistas tuta sistemo de literatura klerigo, ekde bazlernejo ĝis «publika opinio» – en Esperanto ĉio pli komplikas. La aŭtoroj multas, libroj des pli – kiel orientiĝi, kiel elekti? Bona varianto estas komenci de krestomatio, ricevi impresojn pri kelkdek aŭtoroj, kaj poste jam konscie akiri verkojn laŭ siaj gustoj kaj preferoj.

La *Fundamenta Krestomatio* de 1903 estis multfoje reeldonita poste, tamen ĝi nun aspektas arkaika kaj naiva. Kaj fakte, dekomence ĝi havis alian celon. Do nesubtaksebla estas la *Baza literatura krestomatio* (1979), redaktita de Vilmos Benczik. La unua eldono rapide elĉerpiĝis, en 1982 sekvis la dua, iom ampleksigita, kaj en 1986 aperis la tria (identa al

la dua). Baldaŭ post tio, bedaŭrinde, la eldon-agado de Hungara Esperanto-Asocio kolapsis. La dua eldono de la *Esperanta antologio* (1984), la duvoluma *Trezoro. La Esperanta novelarto* (1989) kaj la *Nova Esperanta krestomatio* (1991) estas pli ampleksaj kaj multe pli kostaj, do destinitaj por jam spertaj literaturŝatantoj. Vasta publiko bezonas libron ĝuste bazan. Kaj dezirinde ĝisdatan, ja dum pasintaj jardekoj aperis pluraj novaj aŭtoroj kaj verkoj.

Do nepre laŭdindas la nun aperinta kvara, grave kompletigita eldono. Al 134 verkoj aŭ verkfragmentoj de 59 aŭtoroj aldoniĝis la «Postrikolto»: 64 verkoj aŭ verkfragmentoj de 23 novaj aŭtoroj; krome en la unuan parton estas enmetitaj du pliaj prozfragmentoj el Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová. Aldoniĝis ankaŭ biografioj de ĉiuj aŭtoroj, multe pli ampleksaj ol la priskriboj en la unuaj eldonoj, kaj pri pli granda nombro da personoj (verkis Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka).

Recenzante antologiojn kaj krestomatiojn, oni kutime taksas ne la verkojn mem (plejparte jam konatajn, almenaŭ por literatur-spertuloj), sed la principojn de kompilo. Evidente taksu la unuan parton, finkompilitan en 1982, estas iom malfrue, ni nur menciui, ke Kalocsay estas reprezentita per 9 pecoj, Baghy per 8, Auld per 7... kun tio ne eblas malkonsenti. Cetere, Zamenhof ricevis nur 6, kaj eĉ tio eble estus tro, tamen estas deviga bazo...

Por la «Postrikolto», miascie, ĉefe István Ertl (kunlaboris ankaŭ Aleksander



Baza Literatura Krestomatio
Komp., red. Vilmos Benczik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Russ Williams; Antaŭpar. Aleksander Korĵenkov; Enkond. Vilmos Benczik; Biografioj: Vilmos Benczik, Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. – 4a eld., kompl. – Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2019. ISBN 978-609-95087-7-1.

Elŝutu la demonstran version (50 paĝoj el 368): <http://esperantondo.ru/Knigi/Blk-demo.pdf>

Korĵenkov kaj Russ Williams) elektis novajn aŭtorojn, kaj poste la vivantaj aŭtoroj mem decidis, kion proponi por la bukedo. Fakte, nemalbona principo, ja kiu scias verkojn de iu certa aŭtoro pli bone ol li mem? Kaj la arta gusto de I. Ertl konatas kaj neriproĉeblas... nu, preskaŭ.

Do kion ni vidas? Oni povas konsenti, ke Camacho estas tre talenta poeto inter nun vivantaj (liajn personajn trajtojn oni prefere prisilentu), sed 17 pecoj de li?? Ĉu vere li valoras kiel Kalocsay kaj Baghy kune?? Pli atenta esploro tamen konstatiĝas, ke la 17 eroj de Camacho estas plejparte mallongaj, do okupas entute 8 paĝojn, dum Kalocsay estas prezentita per 18 paĝoj, Baghy per 17.

Oni povas longe diskuti, kial aperis tiuj aŭtoroj kaj ne aperis tiuj ĉi. Afero de gusto. Miaopinie la elekto akcepteblas, tamen mi bedaŭras, ke (ĉu pro troa modesto?) I. Ertl enmetis nenium propran poemon...

Tamen pasis monatoj, enmiksiĝis la kronvirska epidemio, kaj la rusia poŝto pruvis sian aĉan reputacion: post duonjaro iĝis tute klare, ke la ekzemplero de la *Baza literatura krestomatia*, sendita al mi, perdiĝis sen spure. Mi, tamen, tre bedaŭrus forĵeti jam verkitan tekston. Do...

Kaj mi ne perdas esperon, ke iam mi tamen ricevos ekzempleron, aŭ almenaŭ elektronikajn tekstojn de mankantaj por mi 18 eroj, kaj do tiam povos reverki tiun ĉi recenzon.

Mi proponis tiun ĉi recenzon al *Beletra Almanako*. István Ertl dekomence varme aprobis ĝin, tamen nature avertis, ke decidis la tuta redakcio. Aliaj redakcianoj tamen, kiel diras mia kolego, *sentis pismismon*. Laŭvorte: «Inter la opinioj de la redakcianoj estis: recenzo ankaŭ devus pritaksi la ecojn de libro kiel libro». Nu, ĉu vere mencio pri (mal)bonkvalita papero kaj tiu (eĉ plej ofta) pri disfalo de paĝoj post (aŭ eĉ dum) lego, pro aĉkvalita gluo, same gravas kiel enhavo?... Alia kontraŭargumento estis, «ne krei precedencon». Hmm, ĉu oni neniam kreu precedencon de senŝofora aŭto? De pago per poŝtelefono? De flugo en aero (ja homo ne havas flugilojn – do Dio klare malpermesis al homo flugi, ĉu ne?)? Ĉu traleĝinte 46 el 64 novaj libropartoj (kaj 134 malnovajn, do entute 180 el 198), oni ne ricevas adekvatan imagon pri la antologio?... ■

RACÓ DE POESIA

L'ASTRÒNOM


Nicolau Dols

El cant XII de *La infana raso* (1955), de William Auld, comença amb aquests tres versos:

“Newell malpravis: eĉ kapo de astronomo
ne povas enhavi la tutan universon
(bela koncepto, sed karaj, ne tre preciza)”

[“Newell no tenia raó: ni tan sols el cap d’un astrònom
no pot encabir tot l’univers
(bell concepte, però estimats, no gaire precís)”].

Es refereix al poema de Leonard N. M. Newell (1902-1968) “La astronomo”, publicat el 1947 a *Literatura Mondo*. Els versos d’Auld no són, naturalment, una resposta al que diu literalment l’expressió de Newell, sinó el principi d’una reflexió profunda sobre la capacitat creadora del llenguatge. És cert que “La astronomo” de Newell és famós sobretot per aquesta citació d’Auld... però a mi em sembla que en si mateix és d’una bellesa corprenedora i per això l’he volgut anostrar.



LA ASTRONOMO

L. N. Newell (1947)

Li sidis kaj gestadis per stelmapo,
sen ekscitiĝ', komforte sur kanapo;
sed brilis liaj okulvitroj stele.
Malantaŭ li en procesi' bobele
fluadis tajd' el astroj kaj planedoj.
Dum li parolis pri la pens-ekspedoj
mezen de l' spaco, kaj pri l' kalendaroj
de l' kosmo, la homflataj lumojaroj,
kiuj aplikas skalon al Senfino,
pri Andromed', soleca virgulino,
kiu drivadas tra l' malplen' fiera;
kaj li debatis, ĉu nuanc', mistere
misloka en la lumospektro, pruvas
ke ŝi, dum la Eterno tempoplukas,
en fuĝo al mallum' momente brilas,
aŭ tie en ĉiama glori' stabilas.
Pri Betelgez', fantoma lum' giganta,
imperiestre tra l' stelar' ŝvebanta,
parolis li, kaj pri la nigraj truoj
en la ĉiel-tapiŝo -vid-vakuo
el polvo en la praforĝej' de l' astroj.
Priskribis li la froston de la vastoj
mortegaj, kie mil mondaroj fluas
post mil mondaroj; kie rivoluas
radia galaksi' post galaksio
ĝis nepenseblaj kampoj de l' Nenio,
kie la homa menso terurite
en paralizo diseriĝas splite.
Kaj mi rimarkis, kun konsterna gapo,
ke l' Universon tenas homa kapo.

L'ASTRÒNOM

L. N. Newell (1947) (trad. Nicolau Dols)

Assegut al sofà amb una carta
celeste hi feia gestos sense dèria,
si bé tenia estels a les ulleres.
Per darrere marxaven les bombolles
d'una marea d'astres i planetes.
I parlava de com el pensament
s'envola per l'espai, del calendari
del cosmos, l'altivesa dels anys llum,
que volen posar brida a l'infinit,
i d'Andròmèda, verge solitària
que orgullosa deriva en la buidor;
i es demanava si un tret minúscul,
anomia de l'espectre, prova
que la verge és només un punt de llum,
una gota en la pluja de l'etern,
esplendent tot fugint envers la fosca,
o si per sempre es revesteix de glòria.
També de Betelgeuse, esfera immensa
que plana entre els estels amb majestat,
s'ocupava l'astrònom, i dels negres
forats de la celèstia, com ulls
cegats de pols de l'obrador dels astres.
Va descriure calfreds d'immensitats
inertes, per on suren mons de mons
per darrere mil mons, i on orbiten
galàxies darrere més galàxies
fins als camps impensables del no-res,
allà on la ment humana esfereïda
es dissol esqueixada en la paralisi.
I amb estupor vaig veure com conté
sencer tot l'univers el cap d'un home.

MEMORANTE MARIÀ JAQUOTOT

Xavier Margais Basi

Marià Jaquotot Molina estis majorkano kaj esperantisto de la 20a jarcento. Li naskiĝis en Palma en 1897, kaj li ankaŭ mortis en Palma la 3an de januaro 1994 en la aĝo de preskaŭ 97 jaroj. Tute konvulsia jarcento, kiun li vivis kun intenseco.

Li studis ĉe La Salle kaj poste ĉe la Komerca Lernejo de Palma, kaj lernis Esperanton en 1909, en la aĝo de dek du jaroj, motivita de la kongreso okazinta en septembro en Barcelono kaj prezidita de Zamenhof mem. En tiu Universala Kongreso partoprenis kelkaj majorkanoj, kiel Gabriel Alomar, Narcís Bofill kaj aliaj. Poste Gabriel Alomar instruis Esperanton vespere ĉe Monti-Sion kaj la tre juna Marià aliĝis. Du jarojn antaŭe aro de esperantistoj fondis la Esperantistan Klubon Palman, kaj li kune kun lia amiko Joan Mascaró i Fornés aniĝis al ĝi. Ili konis unu la alian ekde la oka jar-aĝo, kiam ili estis samklasanoj.

Marià okupiĝis dum sia tuta vivo pri la komerco post la studoj, kiujn li faris kiel junulo. Ekde 1916 lia nomo aperas kiel ano de pluraj estraroj de Foment del Civisme. En 1938, post la morto de Narcís Bofill, posedanto de la lignitminoj inter Alaró kaj Lloseta, li estis administranto de tiu entrepreno.

Samtempe li estis aktiva membro de la Esperanto-movado en la unua parto de la dudeka jarcento. Li okupis diversajn postenojn en la sinsekvaj estraroj kaj partoprenis tre aktive en la XIIa Kongreso de KEF (Kataluna Esperantista Federacio), kiu okazis en Palma de la 21a ĝis la 24a de majo 1925. Li partoprenis ankaŭ la Kongreson okazintan en Sóller en 1927. Marià havis rilaton kun esperantistoj el la tuta mondo. Li korespondis kun multaj samideanoj kaj gastigis tiujn, kiuj vizitis Majorkon. Li havis tre gajan, jovialan kaj amikan karakteron kaj estis alte taksata de ĉiuj, kiuj rilatis kun li. Ĉio ĉi daŭris ĝis 1936. Post la faŝisma puĉo la tuta esperantistaro estis suspekta. Kvar el ili estis mortigitaj: Sebastià Crespí Valls, Antoni Coll Sastre, Joan Matas Soler kaj Josep Salom Nadal, kaj aliaj estis punitaj en malliberejo aŭ ekzilitaj. Tiuj, kiuj restis, inkluzive Marià, vidis, ke la tuta materialo, kiun ili havis en la klubo, estis danĝera, ĉar se la faŝistoj vidus ekzemple leteron el Rusujo en lingvo, kiun ili ne komprenas, ili povus akuzi pri spionado aŭ konspiro la samideanojn. Do ili detruis la plejparton de la skribita kaj presita materialo, kiun ili konservis. Domaĝo por historiistoj, sed sekurigilo de iliaj vivoj.



RAPHEL PHERRE

TOT RECORDANT MARIÀ JAQUOTOT

Xavier Margais Basi



Marià Jaquotot Molina va ser un esperantista mallorquí del segle xx. Va néixer a Palma el 1897 i va morir també a Palma el tres de gener de 1994, amb gairebé 97 anys. Tot un segle convuls que va viure amb intensitat.

Va estudiar a La Salle i després a l'Escola de Comerç de Palma. Va aprendre esperanto l'any 1909, a dotze anys, motivat pel congrés que es va celebrar el mes de setembre a Barcelona i que va presidir Zamenhof mateix. Hi varen assistir uns quants mallorquins, com Gabriel Alomar i Narcís Bofill. Després, Gabriel Alomar va fer classes d'esperanto als capvespres a Monti-Sion i el jove Marià s'hi va apuntar. Dos anys abans, un grup d'esperantistes havien fundat l'Esperantista Klubo Palma i ell, juntament amb el seu amic Joan Mascaró i Fornés, amb qui es coneixien des dels vuit anys com a companys d'estudis, s'hi va afegir.

Es va dedicar durant tota la vida laboral al comerç, d'acord amb els estudis que havia fet de jove. Des del 1916 el seu nom apareix en juntes directives del Foment del Civisme. El 1938, després de la mort de Narcís Bofill, propietari de les mines de lignit entre Alaró i Lloseta, en fou l'administrador.

Al mateix temps va ser un membre actiu del moviment esperantista de la primera part del segle xx. Va exercir diversos càrrecs a les juntes directives i va participar molt activament en el XIIè Congrés de KEF (Kataluna Esperantista Federacio) que es va celebrar a Palma del 21 al 24 de maig del 1925. També va participar en el congrés que se celebrà a Sóller el 1927. Marià tenia relació amb esperantistes de tot el món. Hi mantenia correspondència i allotjava a ca seva els qui visitaven Mallorca. Tenia un caràcter molt jovial i simpàtic i era molt valorat per tots els qui el tractaven. Tot això va durar fins al 1936. Amb el cop d'estat feixista els esperantistes varen passar a ser sospitosos. Quatre varen ser assassinats: n'Antoni Coll Sastre, en Sebastià Crespí Valls, en Joan Matas Soler i en Josep Salom Nadal, i altres varen viure la repressió, l'empressonament o l'exili. Els qui quedaren, entre ells en Marià, varen veure que era perillós tot el material que tenien al club, perquè si els feixistes veien, per exemple, una carta de Rússia en un idioma que no entenien els podien acusar d'espionatge o de conspiració. Així va ser que destruïren gran part del material escrit i imprès que guardaven. Una llàstima per als historiadors, però una salvaguarda de les seves vides.

En Marià tenia una possessió, Son Antic, al petit poble de Biniali, i allà va tenir algunes setmanes amagat el seu amic Joan Mascaró abans que s'exiliés, primer a Argèlia i després a Anglaterra.

L'activitat esperantista va quedar suspesa durant molts anys, però en Marià continuava sent esperantista tot i que ni ell ni ningú no feia un ús públic de la llengua.

